

BRAZILA ESPERANTISTO

51-A JARO

JULIO-AUGUSTO 1957

N.º 520-521

XV-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO



La Ministro por Eksterlandaj Aferoj, Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, faras la paroladon en la solena inaŭgura kunsido.

51-a Jaro JULIO-AUGUSTO 1957 N.º 520-521

BRAZILA ESPERANTISTO

(«O Esperantista Brasileiro»)

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921
Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefona: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo
de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. I.
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15
respondukuponoj

QUOTA ANUAL DE ADESÃO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO 1956

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto»	60,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	150,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista «Esperanto»	250,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	400,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	1.500,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	5.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º

Rio de Janeiro, DF.

BIBLIOGRAFIO

Dr. Ferenc Szilágyi — CURSO PRÁTICO DE ESPERANTO. Com exercícios de leitura e versão e 210 ilustrações. Adaptado ao uso dos povos da língua portuguesa por Ismael Gomes Braga. — 3.ª edição em português. Cooperativa Cultural dos Esperantistas Ltda. Rio de Janeiro.

La nova eldono de ĉi tiu praktika kurso, adaptita al uzado de memlernantoj parolantaj la portugalan lingvon plene montras ĝian meriton por la celoj al kiuj ĝi estas destinita.

Paŝo post paŝo — Memorlibro okaze de la 10-jara jubileo de Esperanto-Societo Bjelovar, en Jugoslavio (1945-1955) 62 p. + 13 p. kun ilustraĵoj.

La verketo enhavas ĉapitrojn pri la historio de Esperanto-movado en

Bjelovar kaj pri tiu urbo, kaj beletrajn verkaĵojn, originalajn kaj tradukitajn.

La Navigantoj, movado por Biblia kono, famigita per kampanjoj de Billy Graham, Youth for Christ, Sveda AKO-teamo ktp., havas nun ankaŭ Esperantan fakon. Interesa koresponda kurso — klasika laŭ enhavo sed moderna laŭ prezento — estas je via senkosta dispono. Petata estas nur respondafranko, se havigebla. La Navigantoj, Orehro, Svedujo.

CURSO POR CORRESPONDÊNCIA

ELEMENTAR (10 lições) —	
Contribuição única que compreende também o livro necessário	200,00
Taxa de exame final e NORMA ELEMENTA DIPLOMO SUPERIOR (15 lições) —	50,00
Contribuição única	400,00
Taxa de exame final e NORMA SUPERA DIPLOMO ..	100,00
MAGISTRAL (20 lições) —	
Contribuição única	800,00
Taxa de exame final e PROFESORA DIPLOMO	200,00

BRAZILA ESPERANTISTO

N.º 520-521 JULIO-AUGUSTO 1957 51-A JARO

GRATULON AL B.E.L.

En la nuna periodo de oraj jubileoje speciale signifan lokon okupas tiu de la Brazila Esperanto-Ligo. Ek de sia fondiĝo en julio 1907 — precize dudek jarojn post la publikigo de la genia verko de Zamenhof — B.E.L., ĝiaj funkcioj kaj la brazila esperantistaro daŭre, sindone, klere kaj tial celtrafe disvastigadis la Internacian Lingvon kaj firmigadis ĝiajn poziciojn. Rezulte, la brazilan movadon hodiaŭ karakterizas kaj distingas granda nombro da esperantistoj bonege regantaj la lingvon, pri kio mi mem konvinkiĝis okaze de mia bedaŭrinde tro mallonga, sed ne forgesebla vizito al Rio de Janeiro; firma organizo kun solida materia bazo; valoraj publikaĵoj, kiuj konsiderinde riĉigis la Esperantan literaturon; favoraj rilatoj kun la ŝtataj kaj regionaj aŭtoritatoj; alta reputacio en la kulturaj medioj. Tiuj atingoj — per si mem valoregaj — prezentas samtempe fortikan bazon por plua efika laboro en la nova etapo. B.E.L. vere povas servi kiel imitinda modelo de landa asocio.

Estus, tamen, grandega eraro pensi, ke la sukcesoj de B.E.L. havas gravecon nur por Brazilo. La Esperantismo estas afero ne *nacia*, sed *internacia* en tutmonda amplekso. Tial la Esperanto-Movado havas sencon nur kiel monde vasta. Alimaniere ĝi ne estas konceptebla. Ĝuste tial la akiroj en unu

lando estas samtempe gajnoj de la tuto. Kaj, aliflanke, la progresoj de la tuto ne povas ne reflektiĝi favore je la klopodoj en kiu ajn mondoparto aŭ en kiu ajn speciala fako.

La brazila esperantistaro bonege komprenis tiun fundamentan principon de nia ekzisto kaj de nia agado kiel esperantistoj. Tial B.E.L. jam delonge troviĝas en nia komuna, neŭtrala, supernacia kaj supertendenca, Universala Esperanto-Asocio kaj estas unu el ĝiaj plej fortaj konsistaj partoj, dum tre multaj brazilaj esperantistoj estas samtempe ĝiaj individuaj membroj. Tio fortikigis UEA kaj tial plifaciligis al ĝi sukcese realigi multajn utilajn planojn en la intereso de la tuta Movado, kio siavice helpis la landajn kaj fakajn asociojn en ilia laboro.

En UEA mem la brazilaj komitatoj, delegitoj, komisiitoj kaj kunlaborantoj pri diversaj specialaj taskoj — ekzemple ĉe la UNESKO-instancoj, por eksplicite mencii nur unu — ĉiam akurate kaj plej lojale donis sian helpon per efektiva laboro aŭ per taŭgaj konsiloj kaj sugestoj, kio multege kontribuis al la finaj pozitivaj rezultoj. En la lastaj jaroj la Esperanto-Movado, laŭplane gvidata de UEA, en kiu frate kunlaboras ĉiuj neŭtralaj landaj asocioj kaj ĉiuj fakaj aŭ specialaj internaciaj organizaĵoj, faris vere grande-

gan paŝon antaŭen sur ĉiuj kampoj kaj preskaŭ en ĉiuj mondopartoj, inkluzive Brazilon. Kun ĝojo kaj kontento ni konstata tion. Sed ni tre atentu, ke tiuj sukcesoj ne blindigu nin kaj ne kredigu, ke nun ni povas trankvile ripozi kaj nur rikolti la fruktojn sen plua penado. Tute ne. Nin ĉiujn atendas grandega laboro, por kiu estos necese oferi ankoraŭ multe da energio, sindono kaj inteligento.

Mi estas certa, ke, kiel ĝis nun, ankaŭ en la estonteco B.E.L. — tiu bastiono de la Esperantismo en la nova mondo — estos unu el la plej aktivaj kontribuantoj.

Sinceran gratulon kaj varmajn, tutkorajn bondezirojn al B.E.L. kaj al la tuta brazila esperantistaro.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

O Sr. Vitor Nunes Leal, chefe do gabinete civil da Presidência da República enviou circular aos Ministros e demais órgãos diretamente subordinados à Presidência da República, comunicando haver o Sr. Juscelino Kubitschek dispensado do ponto aos servidores federais e autárquicos que comparecerem ao XV Congresso Brasileiro de Esperanto, a realizar-se entre 14 e 21 de Julho em Niterói.

(*Diário Oficial*, de 1-6-1957)

O Chefe do Executivo Municipal do Distrito Federal assinou decreto dispensando do ponto no período de 14 a 21 de Julho os funcionários que comprovarem sua participação no XV Congresso Brasileiro de Esperanto, em Niterói.

Resolução do Congresso de K.E.L.I.

No Congresso da Liga Protestante — Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.), realizado em Jönköping, Suécia, em 1956, foi aprovada a seguinte resolução:

“Nosso Congresso, considerando a importância da união cristã, está convencido de que a pura união é precipuamente espiritual, e só pode ser alcançada com base na palavra divina, isto é, na Santa Bíblia.

Assim, para cada vez mais alcançar a unidade cristã, incitamos as Igrejas a atentar mais no que a Palavra ensina e a considerar menos suas próprias tradições. Com tristeza aludimos ao fato de que ainda há pessoas humanas, em muitos países, que sofrem por sua fé religiosa ou pela origem de sua raça. Exortamos os cristãos de todo o mundo a colaborar para que cesse tal situação o mais breve possível.

Também queremos chamar a atenção de nossos próprios membros e de todos os outros cristãos para a necessidade de um despertar verdadeiramente mundial; e assim apelamos para nossos irmãos em Cristo, que ardentemente orem a Deus, para que Ele em Sua Graça nos conceda êsse despertar.

Finalmente, pedimos a atenção dos cristãos Evangélicos do mundo para a importância da comum, fácil língua internacional, politicamente neutra. Tal língua nós possuímos, o Esperanto, e apelamos para todas as organizações cristãs, que favoreçam sua divulgação e uso na missão e na colaboração cristã internacional.

Pela Kristana Esperantista Ligo Internacia

H. A. de Hoog, presidente.
D. de Boer, secretário.

(Trad. de *Espero Katolika*, out. 1956).

XV-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

KONGRESO DE LA ORA JUBILEO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Fondita en la 21-a de Julio 1907 de Everardo Backheuser, Alberto Couto Fernandes kaj aliaj sindonaj samideanoj, Brazila Esperanto-Ligo estas unu el la plej malnovaj esperantistaj organizaĵoj en la mondo. La agado de la kleraj pioniroj, kiuj starigis la Ligon, faris Esperanton ĝenerale ŝatata kaj respektata en Brazilo, kie nia Movado estas vigla kaj solida.

La Ora Jubileo de B.E.L. estas celebrata en la kuranta jaro per enhavoriĉa programo: eldono de verkoj tradukitaj el la brazila literaturo, inaŭguro de stratoj, plioftigo de la apero de la oficiala organo, *Brazila Esperantisto*, enkonduko de Esperanto en lernejojn, plibonigo de la servoj de la asocio precipe de la informa fako, pli-grandigo de la membraro.

Ĉefa parto de la memorigaj festoj estis sendube la XV-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Niteroi, ĉefurbo de Ŝtato Rio de Janeiro.

Niteroi, bela urbo kun ĉirkaŭ 250.000 loĝantoj, alnomita «Urbo Rideto», situacias sur la orienta bordo de golfeto Guanabara, vidalvide al la brazila ĉefurbo, Rio de Janeiro, situacianta sur la okcidenta bordo. Niteroi estas fama per siaj blankaj strandoj kaj pro la ĉarma kora afableco de siaj loĝantoj. Plej alloga loko por kongreso!

LA ORGANIZA KOMITATO

La iniciato pri la Kongreso apartenis al Niteroi Esperanto-Klubo. La pro-

gramo, zorge organizita, estis vasta kaj efika. Tiucele laboris dum pli ol unu jaro la Organiza Komitato, konsistanta el jenaj personoj: Honora Prezidanto — Supera Juĝisto Alvaro Ferreira da Silva Pinto (Prezidanto de la Balotada Regiona Tribunalo), Prezidanto — D-ro Mário Ritter Nunes (Prezidanto de la loka asocio, Niteroi Esperanto-Klubo), 1-a Sekretariino — F-ino Edith Wehrs, 2-a Sekretario, — S-ro Sabino Mangeon, Kasisto — S-ro Ivan Madeira Coelho. Komisionoj: Por Propagando — D-ro Joaquim do Couto, S-ro Ivan Moraes, S-ro Paulo Nunes kaj F-ino Maria Prata Nunes; Por Ekskursoj — S-ro Carlos de Moraes Castanheira, S-ino Maria Coeli Castanheira, S-ino Marlice Botelho Belleza kaj S-ino Diva de Souza Nunes; Por Akceptado — S-ro Octávio Vianna Peixoto, F-ino Aristocléia de Araújo, S-ro Jair Gonçalves Pereira, F-ino Maria José Teixeira de Freitas Nunes.

Alta Patrono de la Kongreso estis D-ro Juscelino Kubitschek de Oliveira, Prezidanto de la Respubliko, kaj Honora-Prezidanto D-ro Miguel Couto Filho, Ŝtatestro de Ŝtato Rio de Janeiro. La Kongreso havis ankaŭ la patronecon de aliaj eminentaj personoj.

Al la Kongreso aliĝis 550 geesperantistoj, kaj efektive ĝin partoprenis pli ol 300, venintaj el ĉiuj brazilaj Ŝtatoj. Ankaŭ aliĝis 3 argentinaj, 1 urugvaja kaj 1 bolivia samideanoj.

LA KONGRESA ESTRARO

La kongresanoj interkonatiĝis dum la Prepara Kunsido, okazinta en la 14-a dimanĉo, ĉe Unuiĝo de la Unuagradaj Ŝtataj Instruistoj, sub la prezido de la

Prezidanto de la Organiza Komitato. Tiam estis proponita kaj elektita la kongresa estraro: Prezidanto — D-ro Moacyr Gomes de Azevedo — Prezidanto de la Ŝtata Deputitaro); Vicprezidantoj — Kolonelo Candido Bravo (Prezidanto de S. Paŭlo Esperanta Klubo), D-ro Carlos Resende (Prezidanto de Esperanto Societo de Minas Gerais), Prof. Boris Eston (Prezidanto de Esperantista Societo de Porto Alegre), S-ro Hermes Pita (Sekretario de Esperanto-Asocio de Bahia) kaj Kolonelo Geraldo Pádua (Ĝenerala Sekretario de Brazila Klubo-Esperanto, Rio de Janeiro); Ĝenerala Sekretario, D-ro Mário Ritter Nunes; 1-a Sekretario, Octávio Vianna Peixoto; 2-a Sekretario, S-ro Joel Vasques Manso.

LA MALFERMA KUNSIDO

Vespere oni veturis al urbo Rio de Janeiro por ĉeesti la solenan malfermon

de la Kongreso en la salono de la Biblioteko de Palaco Itamarati, sidejo de la Ministério por Eksterlandaj Aferoj. Tie estis rimarkinda spektaklo! La belega salono, riĉe ornamita, estis tiel plena, ke multaj ĉeestantoj devis resti ekstere en la korta ĝardeno. La kunsido estis prezidita de la Ministro por Eksterlandaj Aferoj, Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, kaj ĝin partoprenis pluraj aŭtoritatuloj, inter kiuj la reprezentantoj de la Respublika Prezidanto, de Ŝtataj Ministroj, de la Urbestro de Rio de Janeiro, de la Ŝtatestro de Ŝtato Rio de Janeiro kaj la Ministro de Polujo en Brazilo.

Naimagebla nokto estis tiu de la malfermo! La muzikistaro komencis la solenon per la ludado de la Brazila Nacia Himno. Transdonante la gvidadon de la laboroj al la Kongresa Estraro, parolis la Supera Juĝisto Silva Pinto, Prezidanto de la Organiza Komitato.



Supre oni vidas la estraron por la malferma solena kunsido, kaj sube parton de la ĉeestantoj, en la aŭlo de Palaco Itamarati.

La Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, Prof. D-ro Carlos Domingues, salutis oficiale la kongresanojn, kun aparta mencio de la alilandaj. Knabino Eda Lucia Damásio ĉarme deklamis, unue en portugala lingvo kaj poste en Esperanto la poeziaĵon de Zamenhof» Preĝo sub la Verda Standardo», kiu tre entuziasmigis la aŭskultantaro. Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, nia eminenta samideano kaj konstanta protektanto de nia afero, per trafa parolado skizis la historion de la Esperanto-Movado ekde ĝia naskiĝo en Brazilo, antaŭ 50 jaroj, kaj kun laŭdoj rememorigis la laboron de Everardo Backheuser, Alberto Couto Fernandes kaj M. A. Teixeira de Freitas, ĉiuj noblaj batalantoj por Esperanto. Elokvente parolis improvize la Prezidanto de la Kongreso, D-ro Moacyr Gomes de Azevedo, kiu akcentis sian esperantistecon ekde la junaĝo kaj ravis la ĉeestantaron per siaj varmaj esprimoj.

Per la ludado kaj kantado de la himno «La Espero» oni finis tiun belan kunvenon.

LA LABORKUNSIDOJ

Dum la aliaj sekvantaj tagoj oni havis la laborkunsidojn, en kiuj estis prezentitaj historiaj raportoj de 16 ŝtatoj el la 20 de la Brazila Federacio pri la Esperanto-Movado dum la pasintaj 50 jaroj, kaj pri la agado de eminentaj esperantistoj jam forpasintaj. Estis omaĝitaj jenaj pioniroj: Everardo Backheuser, Couto Fernandes, Jacome Martins Baggi de Araújo (la unua esperantista brazilano), Venâncio da Silva, M. A. Teixeira de Freitas, José Felipe de Azeredo Coutinho, Cristiano Kraemer, Nuno Baena, Demócrito Rocha, Metódio Maranhão, Hernani Mendes, João Ernesto, Abel Gomes kaj Francisco Valdomiro Lorenz (ĵus mortinta). Estis prezentitaj ankaŭ pluraj

La urbestro de Niteroi inaŭguras la straton Esperanto.



proponoj favore al la pli granda disvastigo de Esperanto. La plej gravaj estis de Niteroi Esperanto-Klubo kaj de Caratinga Esperanto-Grupo. La unua temas pri la enkonduko de la internacia lingvo en la Filozofiaj Fakultatoj kaj la alia pri la starigo de rondirantaj ekspozicioj, facile porteblaj.

En unu el la laborkunsidoj oni aprobis dankesprimon al nia blinda samideano S-ino Balbina de Moraes, kiu estis vera animo en la organizado de la Kongreso.

STRATO ESPERANTO

Ankaŭ dum tiu semajno, en la 17-a, estis inaŭgurita de la Urbestro nova strato en la centro de Niteroi, kun la nomo «Esperanto». En la nomo de la esperantistoj dankis la Urbestron, D-ron Alberto Fortes, nia samideano el Juíz de Fora, Minas Gerais, Kapitano Jorge Firmino de Santana. Oni kantis la himnon.

VIZITO AL AŬTORITATULOJ

Post tagmezo, oni plenumis la programon por vizito al la aŭtoritatuloj, inkluzive de la Prezidanto de la Respubliko, Alta Patrono de la Kongreso kaj sincera amiko de Esperanto. Tion faris delegacioj de la Kongreso, kiuj dankis la registaranojn por la ricevita apogo.

ARTA FESTO

Nun ni alvenas al la amuza parto de la Kongreso. En la Urba Teatro, estis prezentita arta festo, kie oni vidis la teatraĵon «La Manoj de Eŭridico» luditan de J. Barros, en la Esperanta traduko farita de Geraldo Matos laŭ peto de la aŭtoro, la konata teatraĵverkisto Pedro Bloch. La teatraĵo, kiu jam estis ludita en portugala lingvo centojn da fojoj, plene plaĉis en sia Esperanta vesto, kiel montris longaj aplaŭdoj.



La ĉeestantaro dum la arta festo en la Urba Teatro de Niteroi.

Oni aŭdis ankaŭ belajn kantojn klasikajn kaj popolajn, kantitajn lerte kaj bele de harmonia ĥoro, sub la gvido de F-ino Marlice Botelho Beleza.

EKSKURSOJ

Komencante de jaŭdo, 18, oni ekskursis al tri ĉefaj urboj de la Ŝtato: Volta Redonda, alnomita «La urbo de la Ŝtalo», kie staras la plej impona siderurgia fabriko en Sud-Ameriko; Cabo Frio, marborda urbo, kie staras la Industrio de la Salo; kaj Petrópolis, kies klimato, pro la alteco, estas freŝa, agrabla kaj saniga, kaj kie troviĝas historiaj memorigaĵoj de la Imperia tempo. En tiuj ekskursoj la partoprenantoj amuziĝis vizitante la Nacian Siderurgian Kompanion en Volta Redonda, banante sin en la strandoj de Cabo Frio, kaj en Petrópolis vizitante la Imperian Muzeon, la grandegan kaj originalan Hotelon Quitandinha kaj Kinejon Esperanto (ĉi tiu lasta apartenas al la malavara bonfaranto de nia Movado, S-ro José Varanda, nia samideano.

BALO

Sabaton, 20, vespere, en Icaraí, kvartalo de Niteroi, la eleganta societo «Club de Regatas Icaraí» invitis la kongresanojn al granda balo, honore al la Kongreso. La akcepto estis tre afabla, la estraro de la Klubo salutis la vizitantojn kiuj estis kore dankaj al ĝi.

KATOLIKA DISERVO

Por la katolikoj okazis meso dimancon, matene, en la Preĝejo Nia Sinjorino de la Koncipo; faris la meson nia eminenta ĉina samideano, Pastro Johano Baptista Kao, kiu predikis en Esperanto. Bona ĥoro akompanis la meson ankaŭ en Esperanto. Ĉeestis multaj kongresanoj, ankaŭ ne katolikoj.

AKCEPTO EN B.E.L.

Brazila Esperanto-Ligo en tiu sama tago akceptis, je la 15-a, la kongresanojn en sia sidejo en Rio de Janeiro. La kunsida salono estis ornamita



La ĥoro sub la direkto de f-ino Marlice Beleza.



Foto farita dum la vizito al la Nacia Siderurgia Kompanio, en Volta Redonda.

per floroj kaj Esperantaj flagoj. Parolis jenaj esperantistoj: Prof. D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de B. E. L., Kolonelo Geraldo Pádua, kiu oficiale salutis la vizitantojn en la nomo de B. E. L. kaj instigis la filiitajn grupojn al vigla kunordigita agado, kaj S-ro Manoel Borges dos Santos, el Bahia, kiu dankis en la nomo de la kongresanoj la afablan akcepton. Ankaŭ faris salutparolon S-ro André Villafranca, Argentina Esperantisto, kiu esprimis sian admiron pro la sukceso de la Kongreso. La aliurbaj kongresanoj enmanigis al D-ro Mario Ritter Nunes belan bukedon da rozoj, por ke li ĝin transdonu al sia edzino, kiu multe helpis al la preparaj laboroj. Siavice D-ro Ritter Nunes ricevis luksan Esperantan libron kun dediĉo subskribita de la kongresanoj.

Ĉirkaŭ 60 gelernintoj en preparaj kursoj por la Kongreso ricevis diplo-

mojn, donitajn de B. E. L. En ilia nomo parolis la verkisto Renato de Lacerda.

B. E. L. regalis la vizitantojn per dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj. Belan kukon kun la formo kaj koloro de la Esperanta flago tranĉis la plej malnova brazila esperantisto, S-ro Caetano Coutinho, kiu estingis du malgrandajn kandelojn reprezentantajn la 50 jarojn de B. E. L.

FERMA KUNSIDO

En la Urba Teatro en Niteroi okazis la lasta programero de la Kongreso. Tiam parolis dum unu horo la eminenta katedra profesoro João Baptista de Mello e Souza, kiu partoprenis la fondon de B. E. L., kiam li estis 16-jara. D-ro Mário Ritter Nunes raportis la rezultojn de la Kongreso kaj finis per legado de la listo de la samideanoj mortintaj deposed la antaŭa kongreso en 1954. La Kongresanaro stariĝis kaj res-



Kolonelo Geraldo Pádua salutis la Kongresanojn en la sidejo de Brazila-Esperanto Ligo.

tis silenta dum unu minuto honore al la malaperintaj batalantoj. La Kongreso aprobis sugeston, laŭ kiu la XVI Brazila Kongreso de Esperanto okazos en 1959, en Salvador (Bahia), la historia urbo, kiu estis ĝis 1767 la ĉefurbo de Brazilo.

Per elokventa parolado la deputito Moacyr Gomes de Azevedo fermis la sukcesplenan Kongreson, kiun li prezidis.

Kaj la kongresanoj en plena samideaneco kaj amikeco disiĝis kun la adiaŭo: «Ĝis Salvador!».

DIVERSAJ FAKTOJ

— Estis ricevitaj el eksterlando pli ol cent salutleteroj, inter ili tiu de U.E.A. Aŭstralia Esperanto-Asocio sendis saluton per sonbendo, kiu estis plaĉe aŭkultita.

— La Departamento de Pôsto kaj Telegrafo permesis la uzadon dum la Kongresa semajno de memoriga stampilo por stampi korespondaĵojn. La Kongreso eldonis filatelian memorigan folieton.

— La Federacia Registaro kaj la Registaro de diversaj Ŝtatoj kaj komunumoj laŭ peto de la Organiza Komitato decidis doni forpermeson al la publikoficistoj, kiuj ĉeestis la Kongreson. Tial tiuj oficistoj povis partopreni la laborojn de la Kongreso ricevante siajn salariojn, kiel se ili efektive deĵorus.

— La Ministro de Polujo, D-ro Wejciech Chabasinski, kiu ĉeestis la malferman kunsidon, donacis al la Kongreso Esperantajn librojn kaj revuon eldonitajn en sia lando.

— Organizita de «Niteroi Esperanto-Klubo kun la kunlaboro de Brazila Esperanto-Ligo funkciis en Librejo

Dias Vasconcelos, ĉe grava strato de Niteroi, bela ekspozicio en kiu estis montritaj la salutleteroj ricevitaj en eksterlando kaj dekojn da libroj. La ekspozicio kun la Esperanta flago kaj portreto de Zamenhof altiris ĝeneralan atenton.



Dum la ekskurso al Petropolis la Kongresanoj vizitas la Kinejon Esperanto.

— En la sidejo de B.E.L. estis montritaj sur grandaj tabuloj la afiŝoj de UNESKO kun vortoj en Esperanto. Tiuj afiŝoj tre plaĉis al la ĉeestantoj

— Tri denaskaj geknaboj vekis la admiron de la kongresanoj per sia korekta parolado. Ili estis la knabino Nicéia kaj la knabo Carlos, gefiloj de S-ro Carlos H. Dionisio, el São Leopoldo, Rio Grande do Sul kaj la knabo Getúlio, filo de S-ro José Romão Filho, el Caratinga, Minas Gerais. La fervoraj esperantistoj estis varme gratulitaj pro la lerteco de siaj gefiloj.

— Du radistacioj en Rio de Janeiro (Radio Ministério da Educação e Cultura) kaj Rádio Mundial) organizis specialajn programojn, en kiuj parolis diversaj esperantistoj.

— La Kongreso disdonis diversajn interesajn publikigaĵojn. En la malferma kunsido ĉiu ĉeestanto ricevis ekzempleron de la ĵus aperinta tria eldono de Portugala Ŝlosilo, eldonita de Brazila Esperanto-Ligo. Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, ĉiam favora al nia afero, eldonis belan broŝuron, Urbo Niteroi, verkita de S-ro Renato Lacerda en la serio de albumoj pri brazilaj ĉefurboj, kaj ankaŭ faldfolion «Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo». Aliaj publikigaĵoj estis: «Ŝtato Rio de Janeiro, Ĝeneralaj Aspektoj», eldonita de Ŝtata Departemento de Statistiko; A Realidade do Esperanto, eldonita de Niteroi Esperanto-Klubo; kaj Mia Dometo, popola kanto, eldonita de Esperanto-Asocio de Bahia.

— En diversaj kunvenoj oni ludis kaj kantis la himnon de la XV-a Brazila Kongreso kun muziko de F-ino Marlice Botelho Belleza, kaj vortoj de S-ro Jaime Figueiredo, esperantitaj de D-ro Sylla M. Chaves.

PAROLADO DE LIA MINISTRA
MOSTO AMBASADORO JOSÉ
CARLOS DE MACEDO SOARES
EN LA SOLENA INAŬGURA
KUNSIDO DE LA DEK-KVINA
BRAZILA KONGRESO DE ES-
PERANTO, LA 14-AN DE JULIO
1957, EN LA AŬLO DE PALACO
ITAMARATI, MINISTREJO DE
EKSTERLANDAJ AFEROJ DE
BRAZILLO

Antaŭ sepdek jaroj, aŭ pli precize la 14-an de Julio 1887, aperis en malgranda librejo de Varsovio 40-paĝa broŝuro, kiu estis la unua publikigaĵo de Esperanto. La Aŭtoro sin kaŝis sub la pseŭdonimo «Doktoro Esperanto». Li

estis la juna kuracisto Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Estis do kreita por internacia uzado scienca lingvo, kiu rapide disvastiĝis tra la mondo. La revo de Descartes kaj de tiom da aliaj filozofoj kaj pensuloj fariĝis realaĵo.

La unua libro de Esperanto estis eldonita en la lingvo rusa. Tuj poste la Aŭtoro mem, eminenta poligloto, ĝin tradukis en la lingvojn polan, germanan, francan kaj anglan.

La 21-an de Julio 1907 estis fondita en ĉiu tiu urbo — Rio de Janeiro — la Brazila Esperanto-Ligo, difinita por gvidi la Esperanto-movadon en Brazilo.

Ĉirkaŭ 40 jaroj post la historia dato de la fondo de tiu landasocio, Esperanto jam estis vaste diskonata internie. Tiam mi havis la honoron prezidi en ĉi tiu sama ĉambro la kunsidon de la 10-a Brazila Kongreso de Esperanto.

Ĉiuj, kiuj ĉeestis tiun memorindan Kongreson, konstatis, ke la Lingvo de Zamenhof estis konsiderinde progresinta, precipe dum la malfeliĉa tempo de la du grandaj militoj. Efektive la esperantista movado multe suferis la baton de la mondmilitoj. Ĝia propagando malvarmiĝis inter la popoloj, sed en tiuj landoj, kiuj estis ekster la milito, daŭris plue la publikigo de libroj, ĵurnaloj kaj revuoj. Ĉe ni, kvankam ni estis implikitaj en la mondmilito, la aktiveco de la Esperanto-movado superis tiun en la antaŭa duonjarcento.

En la memorinda Kongreso de 1945, fariĝis ekspozicio de riĉa kolekto da libroj, revuoj kaj fotografaĵoj, kiu kategorie montris la brilan venkon de Esperanto en nia lando. Tiam oni eldonis du memorigajn poŝtmarkojn, por

diskonigi tra ĉiuj lokoj de la mondo la sciigon pri tio, ke en Brazilo oni vigle laboradis por la disvastigo de la Lingvo Internacia.

Dum la milito, en du totalismaj regnoj Esperanto estis malpermesita. Feliĉe, post kelke da jaroj Esperanto denove floras en tiuj landoj.

Nur dek du jaroj forpasis post la 10-a Brazila Kongreso de Esperanto, kaj tamen oni povas konstati, ke la laboro farita dum ĉi tiu mallonga tempo prezentas kvanton da efektivigoj pli grandan, ol dum la antaŭaj 38 jaroj.

La brazila kulturtrezoro riĉiĝis per multnombraj verkoj originalaj aŭ tradukitaj en Esperanton. Multaj malnovaj literaturaj revuoj pliboniĝis kaj aliaj naskiĝis en diversaj medioj de la nacia teritorio.

En la ĝenerala kadro de la Universala Esperanto-Asocio, Brazilo iam okupis tre modestan lokon, sed hodiaŭ ĝi okupas la duan lokon, tre proksime de la unua, kie staras Germanujo.

Nur post Brazilo venas Pollando, Francujo, Svedujo, Jugoslavio, Britujo, Bulgarujo, Nederlando kaj aliaj landoj.

La kreskado de U. E. A. impresis la Organizaĵon de la Unuigitaj Nacioj, kaj UNESKO donis al ĝi la titolon Konsultiĝa Institucio pri internaciaj aferoj.

En la Konferenco de UNESKO en Montevideo, 1954, estis aprobita Rezolucio rekonanta kaj laŭdanta la rezultojn atingitajn per Esperanto en la intelektaj interŝanĝoj kaj por alproksimiĝo de la popoloj, kaj deklaranta, ke tiuj rezultatoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO.

Tiu memorinda Rezolucio estis aprobita la 10-an de Decembro 1954 kaj

oficiale publikigita en ĉiuj oficialaj lingvoj de ONU.

La Esperanto-movadon konsideris do la plej alta mondorganizaĵo kiel bonegan efektivigon de la idealoj de paco frateco kaj internacia kunlaborado.

Konsidere de la venkoj kaj spertoj akiritaj dum ĉi tiu unua duonjarcento de B. E. L., mi bone komprenas vian pretendon, kiun la nuna Kongreso, ekzamenos por ĝin prezenti al la kompetentaj aŭtoritatoj de la Respubliko, celante oficialigi la instruadon de Esperanto, unue en la Fakultatoj de Filozofio, poste en la Institutoj de Edukado kaj en la kolegioj, kaj fine, se la sperto ĝin konsilos, en la kursoj de malpli alta grado.

Sinjoro Kongresanoj, la ĉefa temo de ĉi tiu Kongreso estas la historia rememorado de la unuaj 50 jaroj de la afero Esperanto en Brazilo.

Ni povas ĝoji pri la venko de Esperanto ĉe ni, kaj kun plezuro kaj entuziasmo mi gratulas miajn samlandanojn pro la multo jam farita kaj pro ĉio, kion ni esperas fari.

Kun sinceraj deziresprimoj por la sukceso de la Kongreso, mi prezentas al ĉiuj kongresanoj la plej varman bonvenon.

MIKSAJOJ

LIBERECO

Libereco al tiu, kiu volas legi, libereco al tiu, kiu volas skribi; neniu timas malkovron de la vero, krom tiu, kiun la vero povus akuzi.

Robert Burns

NEDERLANDA PROVERBO

Se vi deziras ke porko iru antaŭen, tiru ĝin malantaŭen ĉe la vosto.



Brazila Kroniko

SÃO PAULO

Bebedouro — En ĉi tiu progresanta urbo fondiĝis Bebedouro Esperanta-Societo, la 31-an de marto 1957. Ĝia statuto estas aprobita la 6-an de aprilo. Prezidanto, nia samideano Annibal de Magalhães Carvalho: 1-a Sekretario, Milton Marcucci Novais. Ni deziras plenan sukceson!

SANTA CATARINA

Lages — D. Antídio J. Vargas, Episkopo de la Diocezo de Santa Catarina de la Igreja Católica Apostólica Brasileira, enkondukis la lernadon de Esperanto en la programo de la Seminario de I. C. A. B.

RIO DE JANEIRO, DISTRITO FEDERAL

La 10-an de Aŭgusto komenciĝos la Antaŭsupera Kurso de Esperanto per la Radio Ministerio de Edukado kaj Kulturo, sub la aŭspicioj de Brazila Esperanto-Ligo. Ĝi estos prezentata ĉiusabate de la 15,30 ĝis la 16,00 per la sendostacioj PRA-2, mezaj ondoj en 800 kilocikloj, ondo de 375 m; PRL-3, mallongaj ondoj, en 11.950 kilocikloj, ondo de 25,1 m kaj PRL-5, mallongaj ondoj, en 5.990 kilocikloj, ondo de 50,8 m.

Mutnombra enskribado pruvos al la administrantaro de la Radiostacio, ke oni vere interesiĝas pri Esperanto en la tuta lando.

La enskribintoj ricevos tute senpage la helpan legolibron Karlo, de Edmond Privat, kaj ĉiusemajnan resumon de la lecionoj kun ekzercoj.

Dum la sama tempo oni prezentas programon por informado.

Skribi al jena adreso:

Rádio Ministério da Educação e Cultura, Programa «Esperanto, Língua Internacional» — Praça da República, 141-A, 2.º andar, Rio de Janeiro (DF).

OPINIÕES SOBRE O ESPERANTO

Do Dr. HERMANO NOBRE ALVES, professor da Universidade Católica do Rio de Janeiro:

“A principal vantagem do Esperanto é o fato de ser uma língua internacional. Hoje, quando o mundo começa a compreender que os povos não podem mais viver isoladamente, os esperantistas têm todo o direito de se julgarem os pioneiros. Foram eles um dos primeiros grupos a levantar a idéia de uma fraternidade universal.”

Do Dr. CARLOS LACERDA, eminente jornalista, deputado federal:

“O ideal de promover a paz no mundo, facilitando o entendimento entre os povos por meio de um idioma comum a todas as criaturas, animou o Dr. Zamenhof a criar o Esperanto. Como língua auxiliar, êle exerce um papel relevante, que vale a pena difundir entre todos os povos. Bem haja, pois, o esforço dos que aqui se dedicam a esta tarefa, da qual só resultados bons há que esperar.”

(Do “O Jornal de Natal”, 20-2-57)

Oficiala Kurso de Esperanto

D-ro Adhemar de Barros, Urbestro de la grava ĉefurbo São Paulo, en la Ŝtato São Paulo (dumviva membro de U.E.A. kaj B.E.L.), starigis Komunuman kurson de Esperanto, kiu funkcios sub la direkto de la Sekretariejo de Edukado kaj Kulturo. Organizos kaj reguligos la programojn de la kurso São Paulo Esperanto-Klubo, aliĝinta al B.E.L.

Gratulojn al d-roj Adhemar de Barros kaj Erlindo Salzano, direktoro de la Nacia Departamento de Saneco.

Jen la dekreto, publikigita en portugala lingvo, kiu starigis la kurson:

DECRETO N.º 3.580, DE 29 DE
MAIO DE 1957

Cria o Curso Municipal de Esperanto

ADHEMAR PEREIRA DE BARROS, PREFEITO DO MUNICÍPIO DE SÃO PAULO, usando das atribuições que lhe são conferidas por lei, e

Considerando que o Esperanto, língua universal neutra, auxiliar, destinada a possibilitar, a todos os povos do mundo, o recurso fácil e eficiente de intercompreensão exigido pelo rápido progresso dos meios de comunicação, já penetrou, como expressão vitoriosa, na instituição máxima da internacionalidade — a Organização das Nações Unidas, e que, pelo seu órgão cultural, a UNESCO — é reconhecido como útil às finalidades deste Organismo;

Considerando que o Esperanto é hoje, e de longa data, usado praticamente em muitos países civilizados, funcionando desde 1923 como língua clara na União Telegráfica e Postal Universal, sob recomendação da ex-Liga das Nações;

Considerando que tem sido utilizado em congressos científicos, já contando com vocabulários específicos e, entre ou-

tros, pelo Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística, nas suas divulgações de âmbito internacional;

Considerando que o aprendizado do Esperanto constitui elemento de elevação do nível cultural de estudante, desenvolvendo-lhe a capacidade intelectual, pela sua estrutura acentuadamente lógica;

Considerando que o “São Paulo Esperanta Klubo”, órgão oficial do esperantismo no Estado de São Paulo, fundado em 12 de março de 1937, devidamente registrado, com ponderáveis serviços prestados à arte, à cultura e à ciência, no decorrer dos seus vinte anos de existência, se propõe a propiciar, livre de ônus, o ensino do Esperanto, através de um órgão oficial,

DECRETA :

Art. 1.º — Fica criado neste Município o CURSO MUNICIPAL DE ESPERANTO, que funcionará sob a direção da Secretaria de Educação e Cultura, sem ônus para os cofres públicos.

Art. 2.º — Fica atribuído ao “São Paulo Esperanta Klubo”, o trabalho de organização e regulamentação dos programas do referido Curso, cujo plano será submetido à prévia aprovação do Prefeito, após a manifestação da Secretaria de Educação e Cultura.

Art. 3.º — A fim de que o “São Paulo Esperanta Klubo”, possa desempenhar eficientemente as suas atribuições, deverá ter a sua sede localizada junto ao Curso ora criado.

Art. 4.º — Este decreto entrará em vigor na data de sua publicação.

Prefeitura do Município de São Paulo, aos 29 de maio de 1957; 404 da fundação de São Paulo.

O Prefeito, *ADHEMAR PEREIRA DE BARROS*. — O Secretário de Negócios Internos e Jurídicos, *Francisco Luis Ribeiro*. — O Secretário de Educação e Cultura, *Godofredo da Silva Telles Filho*.

(Fino sur paĝo 16)



O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO



AUSTRIA — Nosso samideano Anton Balague (Kirchenweg 12, St. Pölten, Austria) editou um cartão ilustrado com clichês de sete selos postais de vários países, com o nome "Esperanto". Estes selos foram postos em circulação nos correios respectivos por ocasião de congressos ou exposições esperantistas. Um deles é o selo de 300 réis editado pelo Governo do Brasil para o 9.º Congresso Brasileiro de Esperanto.

BULGARIA — A Administração dos Correios Búlgaros resolveu editar um selo em comemoração ao jubileu de ouro de

Publicado na Diretoria do Departamento do Expediente e do Pessoal, da Secretaria de Negócios Internos e Jurídicos, em 29 de maio de 1957.

O Diretor, *João Pereira Monteiro Júnior*.

Bulgara Esperanto-Asocio, fundada há 50 anos em Tarnova. A Associação propôs e foi aceita a idéia de ter o selo uma vista dessa cidade, e o retrato do Dr. Zamenhof.

GRÁ-BRETANHA — O 41.º Congresso Britânico de Esperanto realizou-se em Weston-super-mare, de 19 a 22 de abril. Correu tudo com grande brilho e satisfação, com os costumados arranjos de reuniões, sessões de trabalho, recepções, ofício divino, excursões, baile e representação da peça teatral *La Urso*, de Checov. O próximo Congresso será em Edimburgo.

ITALIA — A publicação "Notiziario Internazionale" informa que a Sra. Clélia Garibaldi, filha do célebre herói italiano general Giuseppe Garibaldi, cuja esposa foi a heroína brasileira Anita Garibaldi, começou a estudar o Esperanto, para mais facilmente poder comunicar-se com os estrangeiros que constantemente a visitam. A Sra. Clélia conta 90 anos de idade.



La urbestro d-ro Adhemar de Barros subskribas la dekreton n. 3580 de 29-5-37.



LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto,
Medeiros e Albuquerque,
Viriato Correia**

XXIX

LA LADSKATOLETO

Vidinte, ke estis nenio timinda, li reiris al la korto por esplori la aferon.

Kiu stelis la ladon?

Ekzamenante la teron, kiu amasiĝis flanke de la truo, li havis surprizon: la ladskatolo estis tie. Kiu ajn faris la kavaĵon, ne atentis pri ĝi.

Fakte la ladskatolo estis tre solida, sed malgranda. Ĝi havis nur la spacon por la objektoj, kiuj estis bone kunpremitaj en ĝi. Petro ne komprenis tiun misteron.

En tiu momento oni frapis ĉe la pordo. Ekteruro kaptis lin. Ĉu ĝi estus la polico?

Li rapidis grimpi sur la fornon kaj en kavaĵon ĉe la muro, konitan nur de li, li metis la ladskatoleton. Poste li rapidis por malfermi la pordon.

Ĝi estis maljuna najbarino, kiu frapis. La domo de Petro estis malgranda, sed aparta. Apude loĝis virino, kiu edukis nepon, dudekjaran bubon tre petoleman.

La maljunulino venis por senkulpigi sin ĉe li. En la tagmezo la nepo ekprenis ŝtupetaron, surgrimpis lian muron, pasigis la ŝtupetaron al la alia flanko kaj mal-supreniris.

Kion li faris tie, la maljunulino ne sciis. Tamen li diris al ŝi, ke li faris kavaĵon, ĉar li intencis enterigi kofron por konstrui telegrafaparaton elpensitan de li.

La bona virino volis scii, ĉu la knabo faris ian difektaĵon.

Petro revigliĝinte, sin montris surprizita kaj, ĉar li ankoraŭ ne iris en la korton, li invitis ŝin por akompani lin. Li ridis kaj ŝercis pro la petolaĵo de la infano, senkulpigante lin.

Proksimiĝinte al la truo malfermita en la tero, li ne montris indignon kaj diris al la koleriĝinta avino, ke la afero ne gravas, kaj li eĉ petis, ke ŝi ne punu la nepon.

— Eble li lasis iun ludilon tie, kaj per la piedo li diserigis la termontetojn, por ke la maljunulino bone vidu, ke estas nenio suspektinda.

— Vi estas tre bona. Sed tion oni ne devas fari. Pro tio Joĉjo estas hejme eĉ ne povante sin teni piede. Mi batis lin tiamaniere, ke li ĉiam memoros la punon.

Petro trankviligis la virinon kaj akompanis ŝin ĝis la pordo. Tiam li revenis al la loko, kie li lasis la skatoleton.

Tiu loko estis en la interno de la muro. Ĝi estis truo lokita tie, sed en la supra parto en vertikala pozicio. De sube, neniu povis ĝin vidi.

Ĝi ne estis tie hazarde.

Fakte ĉe la komenco Albergaria havis la intencon kaŝi la skatolon en tiu loko. Tio okazis antaŭ kvin jaroj, kiam li komencis pensi pri krimo.

Li faris la truon laŭ la necesaj kondiĉoj, aĉetis la ladskatolon, kaj certigis pri tio, ke la loko estas bonega.

Tamen, poste li ŝanĝis sian ideon kaj decidis pri la kaŝtruo en la tero.

Nun post kiam 5 jarojn jam pasis, la nigriĝo de la muroj, la fulgo, la araneajoj, ĉio faris la unuan kaŝtruan la plej bona. Petro decidis gardi tie la skatoleton.

Leginte la lastaj novaĵoj, li konstatis, ke la afero ne estis ankoraŭ klarigita, kaj vidis, ke estus senprudenteco preni la monon por ia ajn afero. Tiun decidon li observis ĝis la fino de la proceso.

La vesperĵurnalo, kiun li aĉetis, estis falinta sur la planko. Li prenis ĝin denove, ĉar li estis nun pli trankvila. Li trompiĝis. Tiu Rosa, kiun oni arestis, ne estis, kiel ni jam diris ĉi tie, la alia Rosa, amorantino de Albergaria. Ŝi estis neniel identa kun ŝi. Ŝi estis germanino, laŭ la ĵurnaloj.

Petro bone sciis, ke eĉ se tiu Rosa estis la lia, ŝi tute ne konis liajn projektojn pri la bankiero, rilate al kiu li neniam parolis.

(Fino sur paĝo 18)

Esperanto na Imprensa do Brasil

Recebemos e tivemos conhecimento dos seguintes órgãos da imprensa brasileira, com artigos, informações, referências sobre o Esperanto:

CEARÁ, *Jornal da AABB*, Agosto (A língua internacional), de Crato.

RIO GRANDE DO NORTE — *O Jornal de Natal* — (Seção Esperanto em foco, Arlindo Castor de Lima e Izaltino Cavalcanti); *Tribuna do Norte*; *A Caridade*; *Rotary Club de Natal* (Esperanto, fator de unificação, palestra do prof. Raul Lemos no plenário, de 14 de Março), de Natal. *O Mossoroense* (Conferência no Lions Club, pelo dr. Maltez Fernandes), Mossoró.

ALAGOAS — *Gazeta de Alagoas* (ns. 32 a 38 da série de crônicas semanais, de Paulino Santiago. *Jornal de Alagoas*, de Maceió.

BAHIA — *A Tarde* (série de artigos sobre Esperanto, de Antonio Loureiro de Souza e Aristóteles Gomes); *A Bahia*, de Salvador. *Voz do Estudante*, *Diário da Tarde*, de Ilhéus; *Voz de Itabuna*, *O Intransigente*, (com notícias do XV Congresso e artigo de Eleus L. Sá), de Itabuna.

ESTADO DO RIO DE JANEIRO — *O Fluminense* (entrevista com o Desembargador Alvaro Ferreira da Silva Pinto), de Niterói; *J.E.R.*, órgão da Juventude Espirita de Rezende (Página do Esperanto), Rezende; *Correio da Lavoura*, de Nova

Li neniam faris iajn planojn pri estonteco, kiuj ne estis bazitaj sur lia laboro. Si do ne povis havi ian konfidencon por fari.

Kaj al Albergaria revenis la trankvileco.

Estis malfrue. Li enlitiĝis. Sed ne povis dormi. Li klare rememoris tiam kelkajn epizodojn de la fatala vivo de Sanches Lobo. Ĉar lia vivo estis jena:

MEDEIROS E ALBUQUERQUE. Tradukis Y

Iguassu; *A Notícia*, de Campos (Congresso).

SÃO PAULO — *A Gazeta* (O Esperanto em marcha, artigos de Horácio Pereira dos Santos); *A Imprensa* (Importância do Esperanto na vida contemporânea, artigos de Osvaldo Pires de Holanda); *Folha da Manhã* (artigo do prof. Pedro de Almeida Moura); *Unificação*; *O Dia* (Diário Oficial do Município de São Paulo); *Publicações Farmacêuticas*, n.º 67 (O Esperanto e a terminologia químico-farmacêutica, art. de Cícero Pimentel), da Capital. *O Liberal* (art. de Antonio Zoppi), de Americana. *A Nova Era*, de Franca. *A Voz do Vale do Paraíba* e *A Tribuna*, de Taubaté. *O Clarim*, (Congresso de Niterói, de C.P.), de Matão. *Folha de Londrina*, de Londrina. *O Glerb*, órgão dos alunos da Escola Técnica de Comércio "Cruzeiro do Sul" (art. do prof. Benedicto Silva), Votuporanga.

PARANÁ — *O Estado de Paraná* (art. de Pedro Real), Curitiba.

RIO GRANDE DO SUL — *Correio do Povo*, de Pôrto Alegre.

MINAS GERAIS — *Diário de Minas* (Reverenciemos Zamenhof, artigo de Yolanda de Araújo Costa); *O Diário*, de Belo Horizonte. *Gazeta Comercial* (art. de Cap. Jorge Santana e discurso do Emb. J. C. Macedo Soares) e *O Medium*, de Juiz de Fora; *A Voz do Estudante*, de Caratinga.

DISTRITO FEDERAL (RIO DE JANEIRO) — *Correio da Manhã*, *Diário de Notícias*, *Jornal do Brasil*, *Jornal do Comércio*, *Folha do Brasil*, *Tribuna da Imprensa*, *A Noite*, *Diário Oficial*, *Shopping News* (Esperanto, soneto de Irene de Araújo Monzon), *Boletim da Associação Brasileira de Imprensa* — A.B.I., *Revista de Química Industrial* (O Esperanto e a literatura técnica e científica da química; O Esperanto e a nomenclatura químico-farmacêutica, artigos de Cícero Pimentel); *Revista AABB* — Associação Atlética Banco do Brasil (XV Congresso Bras. de Esperanto, 1 página com fotos do Congresso). *O Globo* (interessante trabalho sobre Zamenhof, como oculista e autor do Esperanto).

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO" RIO DE JANEIRO

Estraro: Prez. D-ro Miguel Timponi; Vicpr. José de Arimatéa Pinto do Carmo; Ĝen-Sekr. Subkol. Geraldo Pádua; 1-a Sekr. Floriano Pessoa; 2-a Sekr. Amarílio Carvalho; Kas. Debora do Amaral Malheiro.

Sidejo: Praça da República, 54, 1.º Andar; Tel. 42-4357

Kunvenoj: Ĉiusabate, de la 15-a ĝis la 18-a.

NIAJ PAĜOJ

Jen novaĵo, kiu certe devas kaŭzi grandan ĝojon al la karaj samideanoj, membroj de BKE: ĉi tiu paĝo de la revuo estas nia, tute nia.

Laŭ interkonsento kun BEL, en ĉiu numero de BRAZILA ESPERANTISTO ni disponos pri unu paĝo aŭ pli, sub nia ekskluziva respondeco (la paĝo kostos al BKE 200 krz).

Por diversaj celoj ni povos utiligi tiu(j)n paĝo(j)n; mi citos tri el ili:

a. Publikigi la plej interesajn verkojn prezentitajn en niaj kulturkunvenoj, kio ĉiam estas plaĉa premio al la aŭtoroj.

b. Informi pri la kuranta aktiveco de la societo tiujn anojn, kiuj pro iu motivo ne povas ĉeesti la semajnajn kunvenojn de BKE.

c. Plifaciligi niajn rilatojn kun la aliaj brazilaj societoj samspecaj.

Oni facile komprenas, ke la afero estos same avantaĝa por nia Klubo kiel por la Ligo.

Efektive sendependa revuo estus tre multekosta por nia kaso, eĉ se ni kontentiĝos per modesta revueto, multobligita kaj enhavanta nur kelkajn paĝojn. Krome la afranko konsiderinde pligrandigus la elspezojn.


Siaflanke BEL ne multe perdos; ankaŭ ĝi gajnos, pro tio ke BRAZILA ESPERANTISTO ampleksiĝos sen granda elspezo fare de nia landa asocio. La Ligo ne devos elpoŝigi pli da mono por la ekspedado de la revuo al ĉiuj niaj anoj, tial ke ili estas samtempe membroj de BEL laŭstatute, kaj do abonantoj de la revuo.

Se la ideo plaĉos al aliaj el la kunfrataj societoj, estos nenia motivo, kial iam ne povos realiĝi nia delonge dorlotata revo: vidi la revuon BRAZILA ESPERANTISTO fariĝi duonmonata aŭ eĉ semajna gazeto grandformata.

Kian plezuron ĝi tiam donos al la legantoj, kiuj ĉiusemajne povos per unu fojo informiĝi pri la movado tra la tuta lando!

Ĉiuj membroj de BKE estas kore invititaj kunlabori en la redaktado de niaj paĝoj.

G. P.



Karl Vanselow — NIA LINGVO ESPERANTO — Kolekto de 6 volumetoj eldonitaj de la Aŭtoro — Berlin-Schöneberg — Aka-zienstrasse 20, Germanujo. Ĉiu kaj-ero estas 32-paĝa 10 x 14 cm. broŝ.

En tiu ĉi verko estas 250 belaj popolkantoj, libere tradukitaj el diversaj literaturoj aŭ originale verkitaĵoj en Esperanto. La stilo de la poeto estas simpla, bela, klara kaj korekta.

La plej multaj el la poemoj estas destinitaj por kantado kun tre konataj melodioj; aliaj por deklamado en Esperanto-festoj. Jen specimeno de la stilo:

LA SONGO

Mi songis: Post forlaso de la tero
Fantaziaĵo mia iĝis vero.
Min alvenintan ĉe l' ĉiel-eniro
Salutis Petro per afabla diro
Kaj petis min, ke mi aŭdigu kanton.
Fiera-kore lin demandis mi:
«Sinjoro Petro, ĉu jam ankaŭ vi
Komprenas kaj parolas Esperanton?
Se ĝin ankoraŭ vi ne lernis koni,
Volonte laŭ ĝisnuna mia faro
Mi estas preta por instruon doni
Al vi kaj al la tuta anĝelaro.»

Recenzo

Kion parolis li? Jen la respondo:
«Ne plu necesas la instru' por ni.
La lingvon por la tuta homa mondo
Ni jam komprenas ankaŭ tie ĉi.
Li, kiu ne plu vivas sur la tero,
Ĉe ni li estas, li aŭskultos vin.
Pri la modela lingvo de l' espero
La kara Majstro mem instruis nin.
Bonvolu do ĝojigi nin per kanto
En la ĉiela lingvo Esperanto.»

La verko de Karl Vanselow estas tre populara kaj kreas ĉe la junularo de Germanujo kaj aliaj landoj amon al popola poezio en Esperanto. Neniun alian kolekton da popolaj kantoj posedas nia lingvo. Oni devas kiel eble plej multe diskonigi tra la mondo tiun trezoron.

MAŝINOJ, MONO KAJ
MONDPACO — Sociekreditano
Parolas. — Eldono de The Social
Credit Co-Ordination Centre —
Gordon House, Carrington Street,
Nottingham — Anglujo. — Broŝ.
12 x 18, 60 p. Prezo en la libro-
servo de B.E.L.

La fundamenta ideo de tiu ĉi libro ne estas nova, sed la malnova ideo nun prezentigis en maniero pli praktika kaj ŝajne efektivebla.

En la romano de Edward Bellamy — RIGARDANTE MALANTAŬ-EN —, aperinta en 1887, kaj en aliaj libroj aperas la sama fundamenta ideo, nome: la maŝinoj, domoj, urboj, bienoj, vojoj, scienco, tekniko k. a. de nia tempo estas produktoj de la laboroj kaj penoj de niaj patroj kaj prapatroj, kies heredantoj ni ĉiuj ja estas. Sekve ĉiu nuna homo rajtas partopreni en la prosperado de la mondo, eĉ se li tute aŭ parte ne povas labori, t. e. li aŭ ŝi estas heredanto, sendepende de la devo labori.

La moderna tekniko povas produkti pli ol necese por ĉiuj, tial mizero ne estas pravigebla sur la tero. La proponata solvo estas jena: ĉiu civitano havu de post sia naskiĝo ĝis sia morto la rajton ricevi dividendojn de sia nacio. Se krom tiu rajto li povos labori, li ricevu ankaŭ pagon por sia laboro, kaj sekve li estos pli riĉa, ol tiuj, kiuj ricevas nur la naciajn dividendojn.

Ĉu la homoj vere laboros sen la premo de malsato? Ĉu la libro prezentas utopion?

Mi ne havas la devon respondi tiujn demandojn. Mi nur opinias, ke la libro reliefigas la priokupiĝon de nia tempo por solvi gravajn problemojn ekonomiajn kaj financajn, kiujn la moderna tekniko elŝovas en la mondon, senlaborigante grandajn homamasojn, kiujn maŝinoj anstataŭas.

Ĉiu pensema homo trovos interese studi tiujn ideojn.

HOMENAGEM A Dr. M. A. TEIXEIRA DE FREITAS — 1956. Eldono de Gráfica Araribóia Ltda., Niterói. 1956. Broŝ. 12 x 15 cm.

D-ro Mário Augusto Teixeira de Freitas, laŭ tiu bela broŝuro, estis la plej eminenta brazila statistikisto de ĉiuj tempoj, tial la statistikistoj de ŝtato Rio de Janeiro faris al li grandajn honorigojn post lia morto kaj en tiu broŝuro estas unu el la diskursoj pri li. B.E.L. partoprenas en tiaj omaĝoj, ĉar M. A. Teixeira de Freitas estis unu el la plej fervoraj amikoj kaj propagandistoj de Esperanto en nia lando dum jardekoj. La broŝuro estas en la portugala lingvo.

JORGE HESS — SABE USTED ESPERANTO? CURSO PRACTICO DE LA LENGUA INTERNACIONAL (Ĉu vi scias Esperanton? — Praktika Kurso de la lingvo internacia). Eldono de Liga Argentina de Esperanto, Castelli 265, Buenos Aires. 1956. 1 vol. 160 p. 12 x 17 cm. broŝ. Prezo Cr\$ 80,00 en la libroservo de B.E.L.

Tiu ĉi bela lernolibro havas antaŭparolon de nia eminenta samideano Prof. Enrique Balech, kaj estas riĉe ilustrita de Carlos Wappers.

Jorge Hess estas kompetenta esperantisto kaj faris grandan servon al Esperanto en la vasta mondo de hispana lingvo. Lia nova lernolibro estas tre moderna kaj plaĉa. Estas kelkaj presraraj pri kiuj mi skribas rekte al la aŭtoro, penante kunlabori kun li en reviziado por dua eldono, ĉar certe tia bonega libro havos multajn eldonojn.

I. G. B.

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

IMPRESOJ EL MIA INFANECO

Joaquim Nabuco

La impresoj, kiujn mi konservas el tiu aĝo, klare montras, kiel profunde kuŝas niaj unuaj fundamentoj. Ruskin skribis jenan varianton de la penso de Kristo pri la infaneco: «Infano ofte tenas inter siaj malfortaj fingroj veraĵon, kiun matura homo ĉe sia tuta fortiĝo eĉ levi ne povus kaj kiun nur maljunulo havos denove la ekskluzivan kapablon porti.» Mi havis en miaj manoj kiel infanludilojn la tutan simbolaron de la religia revo. Ĉe ĉiu paŝo mi trovas inter miaj rememoroj miniaturojn, kiuj pro sia freŝeco de presprovaĵoj, eĉ antaŭ ol mi ilin konsciis, certe datiĝas de tiuj unuaj eldonoj de mia animo. Laŭ la perfekteco de tiuj neforviŝeblaj imagoj oni povas taksu la faritan impreson. Tiaj mi vidis la «Kreadon», de Michel Angelo en la Sistina Kapelo, kaj tiun de Rafael en la «Loggie»; malgraŭ mia plej streĉa pripensado, mi tamen povas al neniu el ili doni la internan reliefon de la unua «Paradizo», kiun oni igis preterpasi antaŭ miaj okuloj, kvazaŭ postesignon de iama popola Mistero. Mi aŭdis unuopajn notojn de la Angêluso el la roma Campagna, sed la interna muezino, la sono, vibranta ĉe miaj oreloj en la momento de preĝo, estas la voĉo de tiu eta sonorilo, kiun la sklavo aŭdadis kun klinita kapo, murmurante la kutiman «Laŭdata estu Nia Sinjoro Jesuo Kristo». Tio estas la neŝanĝebla Millet, kiu gravuriĝis en mi. Multe da fojoj mi traveturis la oceanon; sed se mi volas ĝin rememori, mi ĉiam havas antaŭ

la okuloj, subite haltintan, la unuan ondon stariĝintan antaŭ mi, verdan kaj travideblan kiel smeralda ekranego, unu tagon, kiam, trairinte vastan kokosarbaron malantaŭ la pajlokovritaj kabanjoj de la flosistoj, mi ektroviĝis sur la marbordo kaj ricevis la subitan, fulman ekkonon pri la fluida sin movanta tero... iu ondo, fiksita sur la plej sentema plato de mia infana kodako — jen kio fariĝis en mia animo la eterna kliŝo de la maro. Nur sub ĝi mi povus skribi: «Thalassa! Thalassa!».

P. C. N.

NEKROLOGO

Francisco Valdomiro Lorenz

En la aĝo de 84 jaroj kaj 5 monatoj forlasis nian mondon Francisco Valdomiro Lorenz, la 24-an de Majo, en Porto-Alegre, ĉefurbo de ŝtato Rio-Grande-do-Sul, kie li loĝis jam de kelke da jaroj.

Li naskiĝis en la 24-a de Decembro 1872, en la vilaĝo Zbislav, en la malnova Bohemujo (tiutempe provinco el la nordokcidenta parto de la imperio Aŭstro-Hungarujo).

En la aĝo de 17 jaroj li konis jam multajn lingvojn, kaj ankaŭ Esperanton. La 39-a eldonaĵo aperinta pri tiu lingvo, en 1890, estas lia verko. per bohema lingvo: Uplna eĉubnice mezinárodní reči D-ra Esperanta. Napsal Fr. Ul. L. Plena lernolibro de lingvo internacia de D-ro Esperanto. Por bohemoj skribis Fr. Vl. L. 1 vol. (19 x 12), 27 paĝoj — Pardubice, 1890 — F. Hoblik presis.»

(Fino sur paĝo 23)

PLANO DE ORGANIZO DE LA BRAZILA ESPERANTO-MOVADO

(Daŭrigo)

II — INFORMADO

7. ĜENERALAJOJ

a. Principoj

(1) Informado kaj kulturo («Lingvo venkas per sia kulturo»).

(2) Informado kaj propagando (diferencoj).

(3) Informi pri ĉio inda (organiza, instrua, kultura, ktp).

b. Celoj (oponanto, kaj indiferentulo — simpatianto — societanoj — ĝisosta esperantisto).

(1) Favorigi la ĝeneralan opinion.

(2) Konigi nian kulturon.

(3) Havigi:

— lernantojn al niaj kursoj;

— anojn al niaj societoj;
— bonajn esperantistojn al la movado.

c. Limoj inter kulturo kaj informado.

8. ORGANIZO

a. Komisiono por informado.

b. Ĝiaj Esperanto-rilatoj:

(1) Kun la societo:

— estraro;

— komisiono por instruado;

— komisiono por kultura vivo.

(2) Kun nacia informservo:

— ricevo de nacia informbulteno;

— sendo de agadraporto.

(3) Kun internacia informservo

— same sed pri urĝaj aŭ gravaj aferoj.

(Daŭrigo de paĝo 22)

Por eviti politikan persekutadon Lorenz forlasis sian patrujon kaj transloĝiĝis en Brazilon en 1893. Komence li laboris en la ŝtatoj Rio-de-Janeiro kaj Minas-Gerais, sed lia celo estis la ŝtato Rio-Grande-do-Sul, kie li havis amikojn. En la kolonio São Feliciano (nun Dom Feliciano) li fariĝis terkulturisto. Poste li plenumis diversajn oficojn. Li estis ŝtata tradukisto, kontrolisto de enmigrado, poŝtovicisto, kaj fine lernejestro, ĝis lia emeritiĝo en 1943.

Li edziĝis kun germandevena fraŭlino, kiu donis al li dek idojn, kaj mortis en 1944. Vidviĝinte, li denove edziĝis.

Dum lia 64-jara vivado en Brazilo, krom pluraj ŝatataj libroj en portugala lingvo (Iniciação linguística k.a.), Lorenz verkis en Esperanto: «Diverskolora bukedeto (Poemoj kaj poemetoj tradukitaj el 40 lingvoj)»; «Bhagavad-Gitâ, el la sanskrita originalo verse tradukita»; «Voĉoj de poetoj el la Spiritita Mondo»; «Esperanto sem mestre»; «Antologio de Brazilaj poetoj», ankoraŭ ne presita.

Kvankam Lorenz ne preterlasis koni la diversajn projektojn pri lingvoj, kiuj aperis (Ido, Bolak k.a.), li estis ĉiam sincere sindona esperantisto.

La memoro pri tiu eminenta, kaj samtempe tre modesta samideano neniam estos forviŝita de la brazilaj esperantistoj.

- c. Programo de la komisiono (jara laŭmonata programo).
- d. Budĝeto.

9. KVALITOJ DE INFORMANTO KAJ DE INFORMADO

- a. La informanto
 - (1) Digneco (kion nepre eviti).
 - (2) Fiero (pri Esperanto; formeti komplekson de malplivaloro).
 - (3) Filozofeco (pri homa inerteo; ne nervoziĝi: resti afabla eĉ antaŭ homoj, kiuj stulte rilatas al Esperanto).
 - (4) Diplomateco (cedemo, flato de ĝis ia grado).
 - (5) Informiteco.
- b. La informado
 - (1) Prezenti niajn celojn kaj teoriojn (ne tro).
 - (2) Anonci niajn agadojn (taŭge, rapide, ĉiam).
 - (3) Raporti pri niaj agadoj (ĉiam, kaj plej digne).
 - (4) Agi tiel, ke la gazetistoj mem parolu pri ni.
- c. Diversaj konsiloj
 - (1) Ne forlasi rektan informadon de gravuloj.
 - (2) Konsili ĉiujn anojn, kiel agi.

10. FONTOJ

- a. Bazaj konoj (viziti kursojn).
 - (1) Lingvajn.
 - (2) Lingvistikan.
 - (3) Literaturan.
 - (4) Historian.
 - (5) Informan.
- b. Kelkaj fonteldonoj (informoj pri ili kaj komentoj).

- (1) Enciklopedio de Esperanto.
- (2) Faktoj pri Esperanto (D-ro I. Lapenna).
- (3) Bibliografio de la Esperanto-literaturo.
- (4) Katalogoj de diversaj Esperanto-bibliotekoj.
- c. Esperanto-gazetaro
 - (1) Ĉefaj informaj Esperanto-gazetoj.
 - (2) Elekto de la lastaj Esperanto-eventoj el ili.
 - (3) Informbulteno de la nacia kaj internacia informservoj.
- d. Agado de la loka movado (organiza, instrua, kultura).
 - (1) Ĝin anonci.
 - (2) Ĝin raporti.
 - (3) Inviti ĵurnalistojn okaze de gravaj aranĝoj.

11. RIMEDOJ — ILOJ — ARANĜOJ

(kiaj ili estas).

- a. Publikaj iloj.
 - (1) Gazetaro
 - artikoloj;
 - senpagaj informoj kaj anoncoj;
 - pagataj publikaj anoncetoj.
 - (2) Radio
 - anoncoj;
 - aparta elsendo (informa, kultura).
 - (3) Filmo.
 - (4) Libro
 - broŝuroj pri diversaj aspektoj de niaj lingvo kaj movado.

(Daŭrigo venos)